

LA MEATRICO 2: BOVOLUCIOJ
THE MEATRIX II: REVOLTING
Esperanto Script
Reformmated May 2007

Oni vidas Moopheus kaj Leo en komputilaro. Sur la ekranoj oni vidas personon kiu aĉetas viandon. Poste, persono aĉetas ovojn. Poste, patrino kun infano aĉetas lakton. "10 Milionoj da Mensoj Liberigitaj" montriĝas sur unu el la ekranoj.

MOOPHEUS

Ni jam liberigis 10 milionojn da mensoj el La Meatrico. Personoj ekkonscias pri la deveno de siaj manĝaĵoj. Tre bone, Leo.

CHICKITY

Vi estas La Elektito.

LEO

Chickity!

MOOPHEUS

Restas multaj partoj de La Meatrico. Ek, ni eniru.

Ili iras al la seĝoj, LEO fermas siajn okulojn kaj blekas, kaj subite li staras en feliĉa melkbovina farmbieno.

LEO

Ho! Estas bonege ĉi tie!

MOOPHEUS

Leo!

LEO

Mi ŝategas la herbokampojn.

MOOPHEUS

Leo!

LEO

Ĉu oni akceptas porkojn ĉi tie?

MOOPHEUS

Leo!

LEO

Kio?

MOOPHEUS

Ne, Leo. Rigardu preter la iluzio de La Meatrico. Iam melkbovinaj farmbienoj estis tiaj. Vidu la veron...

La sceno subite fariĝas 'linioj de matrica kodo.' La melkisto fariĝas melkmaŝino, kaj la ĉirkaŭaĵoj fariĝas moderna lakto-fabriko, kun vicoj de bovinaj.

LEO

Ho!

MOOPHEUS

Jen moderna fabrikejo de lakto; oni ne povas nomi ĝin "farmbieno". La plejparto de niaj lakto kaj fromaĝo venas el ĉi tiaj lokoj.

Ni vidas la modernan farmbienon dum MOOPHEUS parolas; melkejo, stalejo, la malsekejo kun multaj kunpakitaj bovinoj, muŝoj, ekskrementaro en la malsekejo, mortintaj bovinoj en la koto – neni herbo, neni akvo, neni ombro. Lago de ekskremento estas malantaŭe, pafiloj de ekskremento ŝprucas likvan ekskrementon.

MOOPHEUS montras al LEO kaj CHICKITY la bovinojn en stalfakoj, multaj aspektas tre malsanaj, kelkaj eĉ ne povas stari.

MOOPHEUS

Iliaj tutaj vivoj pasas inter ĉi tie kaj la melkejo. La malbonaj kondiĉoj malsanigas ilin, malgraŭ ĉiutagaj antibiotikoj. Oni fortranĉas la vostojn por...

Kaŝu vin!

MOOPHEUS kaj CHICKITY rapide forkuras malantaŭ metalan rangon, por ke ili kaŝe vidu. Agentoj de AGRI-CORP elvenas el la veturilo kaj malfermas tekojn plenajn je grandaj injektiloj kun la etikedo 'rBGH', kaj komencas injekti al la bovinoj. Ni vidas, ke la mamoj grandiĝas. LEO pli kaj pli koleriĝas dum MOOPHEUS klarigas.

MOOPHEUS (*sur la supra sceno*)

Jen la agentoj de la Meatriko. Ili injektas la artefaritan hormonon rBGH en tiujn kompantindajn bestojn.

CHICKITY

Kaj kio estas tio?

Ni vidas bovidojn manĝigatajn per ega maŝina mamo.

MOOPHEUS

Oni apartigas la bovidojn disde siaj patrinoj je naskiĝo. Ili manĝas fluaĵon faritan el sango de bovoj.

La laktotuboj, el kiuj la bovidoj trinkas, ruĝiĝas kiel sango.

LEO

Vi ne diras...

MOOPHEUS

Jes, Leo. La vivaj manĝas la mortintajn. Tio povas kaŭzi la malsanon "bovofrenezo."

LEO

Sufiĉe ja!

LEO saltas en la aeron, sed kiam li alteriĝas, li paŝas sur rastilon, kiu batas lin.

CHICKITY

(*al MOOPHEUS*) Ĉu vi estas certa, ke li estas La Elektito?

AGENTO

(al LEO) Kiom ĉarma estas via vizito, S-ro Viand-erson.

LEO

Mia nomo estas Leo!!!!

LEO kuras al la AGENTOJ kaj batalas ilin. Dun LEO mane kaj piede batas, li diras...

LEO

Jen pro la familiaj farmistoj!

(bat!)

Jen pro la hormonoj!

(bat'!)

Kaj jen pro la bovoj!

(bat'!)

Per hufo LEO invitas al la AGENTOJ alproksimiĝi. AGENTOJ kontinuas ataki. Ni vidas AGENTON ĵeti multajn injektilojn!

LEO

Ne.

LEO etendas hufon por haltigi la injektilojn en la aero, kaj ili falas al la planko.

CHICKITY

Vi estas La Elektito!

LEO kaj CHICKITY prenas siajn 'manojn'. Subite ili aŭdas laŭtan blekon kaj vidas, ke oni forkaptas MOOPHEUS-on. MOOPHEUS luktas dum oni tiras lin en la veturilon de AGRI-CORP.

MOOPHEUS

Forgesu min! Haltigu la lakto-fabrikejojn!

La pordo de la veturilo de AGRI-CORP malfermiĝas kaj ĝi rapide foriras kun MOOPHEUS. LEO timiĝas kaj elkrias.

LEO

Ili havas Moopheus-on! Kien ili iras? Kion ni faru? Kiu mi estas?

CHICKITY

(batas LEON) Leo!

LEO

Ni devas savi Moopheus-on!

CHICKITY

Sed vi aŭdis lin. Ni devas haltigi ĉi tiujn fabrikejojn.

LEO pensas kelkaj sekundojn.

LEO

Mi scias!

Ili ambaŭ rigardas al la rigardanto.

LEO

Ni savos Moopheus-on, se VI helpas haltigi ĉi tiujn lakto-fabrikejojn! Aĉetu nur alternativojn. Tiel vi helpos finvenki La Meatrimon.

Li metas ruĝan "AGU"-ŝaltilon sur la ekranon.

CHICKITY estas sur motorciklo malantaŭ LEO.

CHICKITY

Venu Leo!

LEO portas sian okulŝirmilon kaj saltas sur la motorciklon. Ili forveturas al la malproksima urbo.

DAŬRIGOTA...